# FORUMO 129 (2/2005)
# Membrogazeto de L.S.G.




## Ni en Florenco

Ankaŭ sekvontjare ni havos nian jarkunvenon dum la UK. Krome ni prezentos nin kiel kutime al la publiko dum duona tago en la kongresejo.

Nova ideo venis de nova membro el Florenco dum meznokta babilado surstrate en Vilno: Marco proponis, pasigi la tradician ekskursan merkredon komune enkadre de LSG.

Tia ideo tre plaĉis al la tieaj ĉeestintoj. Estas eble, lui buson kun ŝoforo kaj viziti tiujn lokojn, kiuj speciale interesus nin dum tuta tago. La programon plejparte devus proponi Marco, kiu konas la cirkonstancojn plej bone. La tagmanĝon ni supozeble antaŭe devus mendi ie. La tago povus finiĝi ie en

geja ejo en la centro de Florenco aŭ ne tro for de la kongresejo, de kie ni ĉiuj facile povus atingi niajn hotelojn. Do, por 2006 ne mendu la tuttagan merkredan ekskurson ĉe UEA, sed informu antaŭe vian sekretarion pere de (re-)aliĝilo 2006 aŭ aliamaniere, ĉu vi partoprenos aŭ ne, por ke ni povu plani la aferon. La kostojn pagos la partoprenantoj surloke. La prezo dependos de la nombro de la partoprenantoj, sed estos supozeble pli malalta ol ĉe la UEA-ekskurso, ĉar ĉe ni neniu volas finance profiti de la tuta afero. Pli detalajn informojn vi ricevos en unu de la sekvontaj Forumoj. *rk*

# Denova ŝanĝo de redaktanto

Ekde unu jaro Igor el Aŭstralio estas nia redaktanto. En tiu tempo li bedaŭrinde nur sukcesis aperigi unu numeron de nia membrogazeto. Tio ne estas akceptebla labormaniero. Mi tial decidis, aperigi tiun-ĉi Forumon denove memfaritan, kvankam tio vere ne estas mia kampo, por ke vi ricevu la necesajn informojn.

Ekde n-ro 130 Andreas el Gotenburgo akceptis provizore repreni la redaktantecon ĝis ni trovos alian konstantan redaktoron.



Andreas

Vi ricevos Forumo 130 fine de la sekvonta monato decembro.

Tamen pripensu, ĉu tio ne estus tasko por vi en futureco! La estraro kompreneble subtenos vin. *rk*

# LSG dum litova UK

La ĉijara ĝenerala kunveno de LSG je la 24-a de julio 2005 estis la unua aranĝo de la 90-a UK en Vilniuso, kiu okazis post la solena inaŭguro. Dank' al simpatia UEA-estrarano, kiu vespere akompanis nian grupon al gejaj diskotekoj kaj kiu espereble baldaŭ plifortigos niajn vicojn ene de LSG, ankaŭ nia kunvenejo estis premiero: Ni renkontiĝis en salono, kiu portis la nomon de iama samligano, en la salono S–.

Laurynas, profesoro pri franca lingvo en la Vilna universitato kaj longjara LSG-ano, estis membro de la loka kongresa komitato (programo). La 10-an de januaro 2005 li forpasis nur 68-jaraĝa.

La kunvenon gvidis suverene kiel ĉiam nia prezidanto Arnold. Ĉeestis ĉirkaŭ 30 gesamliganoj kaj kelkaj gastoj, entute preskaŭ 50 homoj. La kunvena gvidanto laŭtlegis la tagordon, kiun ankaŭ la partoprenintoj surpapere ricevis. Ni decidis akcepti la tagordon sen ŝanĝoj. Randy deklaris sian pretecon raporti por la 'Kongresa Kuriero'. La informriĉa artikolo aperis en "Vilna Sonoro" n-ro 6. La ĉeestantoj akceptis la protokolon de la antaŭa (Gotenburga) ĝenerala kunveno. Poste la sekretario-kasisto donis ampleksan raporton pri la financa evoluo dum la pasintaj jaroj. La financa situacio de la ligo estas stabila, la evoluo de la membronombroj plue pozitiva. Notinde estas, ke ankaŭ pli kaj pli da virinoj aliĝas. Oni akceptis la financan raporton, malŝarĝis la kasiston kaj per aplaŭdo dankis al li por lia laboro kiel sekretario kaj kasisto en la lastaj kvin jaroj. Dank' al ŝparema mastrumado de la kasisto estis eble proponi al la ĉeestantoj lasi la membrokotizon senŝanĝa (ekde 2002) ankaŭ por la sekvonta jaro. La membroj akceptis la proponon. Ĉar ekzistas kelkaj komunikadaj problemoj kun nia aktuala franca peranto oni diskutis, ĉu landaj perantoj ene de "Eŭrolando" plue estas necesaj aŭ ĉu oni jam povas same malmultekoste ĝiri la membrokotizon ekz. de Francio aŭ Italio al germana bankokonto.

Francis avizis, ke li sukcesis publikigi duonpaĝan varbartikolon pri LSG en franca "Genres", gejlesba jara gvidlibro. La sekretario proponis, ke ni elektu estraranon, kies tasko plejparte estu la varbado en la Esperantogazetaro. La monon por tiu tasko ni havas, kio mankas estas spritaj grafikaj kaj tekstaj ideoj. En tiu konekso li denove insiste petis la kunvenintojn, pli multe kontribui por nia membrofolio "Forumo" por fari ĝin pli interesa kaj por plifaciligi la laboron por nia redaktanto. Poste ni diskutis eblojn por pli bone uzi la interreton flanke de nia ligo. Oni esence konsentis pri tiu propono sed obĵetis, ke granda parto de niaj gemembroj ne havas liberan retaliron. Oni strikte neas la proponon havi "korespondan adresaron" ktp. en la reto, ĉar

neniu povas vere garantii, ke tiuj tre delikataj datumoj (parte de kaŝaj membroj) ne povus esti legataj aŭ eĉ misuzataj de nerajtigitaj personoj.

La ĉeestintaj membroj reelektis Arnold (Novjorko) prezidanto, Rolf (Dresden) sekretario-kasisto kaj Andreas (Gotenburgo) prizorganto de niaj retpaĝoj. La kunveno konfirmis Igor (Sidney) kiel redaktanton de nia membrofolio "Forumo" kaj esprimis per tiu elekto la esperon pri future regula aperado. Novaj estraranoj fariĝis Torstein (Trondheim) kaj Francis (Parizo).

La ĝenerala kunveno decidis okazigi la sekvontan kunvenon dum la 91-a UK en Florenco 2006. La kunveno finiĝis per omaĝo kaj unuminuta silento por niaj forpasintaj membroj.

La ĉiutaga kongresa gazeto "Vilna Sonoro" publikis artikolon de Randy pri nia kunveno.

Ĵaŭdon posttagmeze LSG havis dum pluraj horoj sian publikan prezenton meze de la kongresejo. Pluraj samliganoj estis bone videblaj por la kongresanoj, respondis demandojn al interesatoj, disdonis materialon pri LSG. Estis ankaŭ la ebleco tuj aliĝi kaj surloke pagi sian membrokotizon, kion kelkaj novaj kaj malnovaj anoj utiligis.

Entute Vilno denove estis agrabla kaj interesa okazo revidi sin, refreŝigi malnovan amikecon, konatiĝi kun novaj interesaj homoj kaj pasigi komunan tempon ĝis malfrua nokto… *rk*

# Aliaj pri ni

En la germana revuo "Esperanto aktuell" n-ro 5/2005, paĝo 6, aperis 19-linia artikolo pri LSG kaj Forumo.

# Ek al gayromeo!

Jam de multaj jaroj ekzistas diversaj eblecoj komuniki per interreto. Mi deziras prezenti al vi la platformon: **www.gayromeo.de**. La afero funkcias

kaj angle kaj germane, komuniki vi povas ankaŭ esperante. Per senpaga aliĝo vi jam havas sufiĉe bonajn eblecojn por interagi kun malnovaj kaj novaj amikoj.

Unue vi devas elekti kaŝnomon kaj pasvorton, kiu identigas vin en gayromeo. Poste vi povas doni informojn en via propra "profilo" pri via aĝo, loĝloko, seksrilataj preferoj, fetiŝoj ktp. Ankaŭ eblas alŝuti fotojn. En libera teksto vi povas prezenti vin pli detale kaj laŭ persona vidpunkto. Inter la lingvoj parolataj de vi vi ankaŭ povas elekti Eon!

Tre utila funkcio estas la ebleco fondi grupojn, inter kiuj jam ekzistas grupo "Esperanto", kie kolektiĝas gejaj Esperantistoj. Per tiaj grupoj oni pli simple povas trovi saminteresulojn. Per tre utilaj serĉfunkcioj vi trovas eblajn partnerojn el via urbo aŭ regiono, samlingvanoj, ktp.

Amikojn vi povas listigi en favorlisto, tiel ke vi ĉiam vidas kiam amiko ĉeestas. Sed grava avantaĝo de gayromeo estas la ebleco sendi mesaĝon al amiko ankaŭ se li ne estas rete. Kiam li eniras gayromeon, li tuj vidos la novan mesaĝon kaj povos respondi ĝin.

Se vi pagas fiksitan sumon, vi ankaŭ povos vidi "pornografiajn" bildojn kaj tiucele aparte entajpitan tekston en la profiloj de aliaj uzantoj. membro 329

# Kial Usono drivas en homofobion?

En tempo kiu vidas progreson por gegejaj rajtoj en multaj landoj de la mondo, ŝajne progresema Usono paŝas malantaŭen – ne nur en la kampo de gejaj kaj lesbaj rajtoj, sed en la pli granda kampo de civilaj rajtoj ĝenerale– kial?

Por kompreni tion, necesas scii ke en la jaroj 60 la superaj 10 procentoj de la usonanoj posedis ĉirkaŭ 48% de la nacia bonhavo – hodiaŭ tiuj 10 % posedas 83% de la nacia bonhavo. Ili mem komprenas ke ili okupas endanĝerigitan terenon, malferman al la kritiko de la masoj. Ili timas, do ili, kun sia presidento Buŝ, validigas novajn leĝojn kiuj devos protekti iliajn interesojn en la epoko kiam la masoj rebelos, kiel la “Patriotan Akton” kiu donas al la registaro la rajton malliberigi kiun ajn sen kaŭzo kaj sen neceso pruvi kaŭzon kiam ajn, dirante nur ke tiu ulo suspektiĝas je terorismo, termino leĝa sen difino klara.

Kial la homofobio ludas rolon tiom eminentan en la klopodoj de la superuloj? Estas simpla ekvacio!

Usonaj viroj estas viktimitaj ekde sia naskiĝo. Ili neniam rajtas ŝajni esti molulo – neniel, neniam. La patroj ludas speciale malmole kun la filoj. Se filo emas iel ajn interesiĝi pri "inaj" aĵoj, ambaŭ gepatroj ege ŝokiĝas kaj riproĉas la infanon. En la lerneja ludejo, kiam la viretoj batalas, la geinstruistoj gvatas kaj ŝultrotirante diras: Knaboj estas knaboj. Kio okazas estas la establo de hierarko de plej fortuloj super malpli fortuloj. La knaboj uzas finomojn por la pli malfortaj inter ili: gejo, gejaĉo, molulo, ktp.

Dum la tuta lerneja vivo, tiu sinteno regas en Usono, tiel ke eĉ la adulta viro timas moknomon aŭ deklaron de malfortulo. Estas la triumfo de muskolo super menso. Usona kulturo estas strukturo regata malferme por la plej fortaj.

Tiel eĉ heteroseksa viro timas tiujn moknomojn. La geja viro ŝajnas kiel kaŝita malamiko, kiu ĉiumomente minacas la virecon de la adulto vira en Usono.

Tiu teruro de moko konservas disciplinon ĉe tiuj viroj (kvazaŭ ĉiuj viroj en Usono). Tiel la fanatikaj protestantoj, kiuj klopodas konvinki la tutan usonan popolon ke ili estas la ververaj usonanoj, uzas tiun teruron masklan multe facile por eksciti fortajn emociojn inter siaj sekvantoj kaj sur nacia nivelo en la popolo ĝenerale.

La registaro, agante laŭ la prabrita idearo sub titolo "dividu kaj regu!", danke subtenas la protestantajn fanatikulojn. Neniu en la Buŝa registaro volas ŝajni "mola" en tiu-ĉi demando. Male, oni aktive adoptas la puŝon kontraŭ gegejaj rajtoj por subteni sin eĉ en epoka de grava danĝero.

*Robb*

# Korespondi deziras

LSG-ano serĉas amikon por korespondi inter 30-60 jaroj. Ankaŭ afrikanoj estas bonvenaj. Ady. (Sendu retleteron al la sekretario, lasekretario(ĉe)gmx.net, se vi volas havi kontakton kun Ady.)

# Pri nia ttt-ejo

Kiel vi eble rimarkis nia ttt-ejo ĉe www.forumo.hpg.ig.com.br lastatempe tre malofte aktualiĝas. Ni tre bedaŭras tion.

La kaŭzo estas problemoj ĉe la provizanto de la interreta spaco, "hpg". Ni uzas la senkostajn servojn ĉe "hpg" kaj kompense ni akceptas reklamon sur niaj retpaĝoj. Komence ĉio funkciis bone, sed nuntempe la servoj pli kaj pli malboniĝas.

La estraro tial decidis havigi alian interretan spacon por la retpaĝoj de LSG, ĉi-foje pagendan kaj sen reklamo. Ĝi ekfunkcios iam en decembro kaj en la venonta numero de Forumo venos pli da informoj pri ĝi. (Eble la informoj venos ankaŭ ĉe: www.forumo.hpg.ig.com.br.)

*Andreas*
*prizorganto de la retpaĝoj de LSG*

# Ni legis

**”femina – revuo en esperanto ne nur por virinoj”** estas nova produkto eldonita de la LF-koop. 30-grandpaĝa kaj parte kolora en bona preskvalito ĝi ofertas vere interesajn aspektojn de tutmonda virina vivo.

Speciale interesa por ni estas tutpaĝa respondo al legantino pri lesba temaro.

Unu foto montras kantistinon Daphne el Oceanio, kiun vi jam bone konas el Forumo 120.

# Niaj membroj

**En tiu ĉi rubriko ni volas prezenti al vi la homan elementon de LSG.
Nia hodiaŭa gasto i. a. de 1997 -2000 estis la Forumo-redaktanto.**



---

**Nomo:**
Wolfgang (foje Ulf Steen)

**Naskiĝdato:**
17-a de marto 1957

**Loĝloko:**
Århus (Danlando)

**Profesio:**
Tradukisto, verkisto

**3 homojn, kiujn vi admiras:**
- Peter Ustinov (homarano),
- Arno Schmidt (verkisto, kiu vekis mian intereson por lingvo kaj literaturo),
- Carlo Schmid (la lasta intelektulo en la germana politiko)

---

*Demando: En nia rubriko "Profilo" ni volas prezenti ordinarajn membrojn de LSG.*
Respondo: Jes, ordinara mi ja estas, iuj senhezite eĉ diras "ĝis tedemo". Kaj tiuj eble pravas.

*D: Nu, ni vidu: Kie vi naskiĝis?*

R: Mi enmondiĝis proksime al Zamenhof Esperanto Objekto en la vilaĝo Stockum, meze en okcidenta Germanio. Tie estis pensiulo – kompreneble li ne ĉiam estis pensiulo, sed kiam mi estis knabo, li aspektis oldege – kaj tiu tre favoris Esperanton. Mi havas vagan memoron, ke li venis por rakonti pri sia lingvo kaj siaj travivaĵoj, sed se mi estas honesta (kaj tio indas alstrebi, se estas vi, kiu demandas), mi tiam ne havis eĉ vagan ideon, pri kio li parolis.

*D: Sed poste vi ja konatiĝis kun nia lingvo.*

R: Jes, mi flaris kaj gustumis plurajn lingvojn kaj iam trovis anonceton en prestiĝa geja ĵurnalo. Tio estis en 1982. Tiam mi aĝis 25 jarojn kaj mi estis en la universitato. La loka grupo de Münster estis tre agema kaj afabla. Esperantistoj ĉiam ĝojas, kvazaŭ ili kiel bonaj paŝtistoj povas savi plian perditan ŝafidon. Instigo por mi estis, ke tiam rifuĝinto el Ĉeĥoslovakio venis al la grupo. Tio montris al mi, ke la lingvo ankaŭ havas praktikajn eblecojn.

*D: Kion vi studis?*

R: Literaturon (la germanan kaj anglan) kaj ĵurnalismon. Cetere mi nuntempe studas denove en la germana tele-universitato, sed nun mi okupiĝas pri historio kaj filozofio. Cetere, mi laboras kiel tradukisto.

*D: Kiujn aliajn lingvojn vi konas?*

R: Nun estante en Danio, kompreneble la danan kaj pere de la dana mi komprenas skandinavajn lingvojn. Mi konas iom de la franca, itala, hispana kaj nederlanda. Mi ŝatus lerni pli de la rusa kaj latina. Mi nun flirtetas kun la hinda lingvo. Ĉu viroj povas esti fidelaj? Tamen mi estas, ehem, poligama nur koncerne al lingvoj.

*D: Kial vi venis al Danio?*

R: En 1984 mi konatiĝis kun mia edzo kaj post nelonga tempo ni decidis, ke ni vivu kune. Rakontu tion al tiuj, kiuj asertas, ke gejoj ne povas vivi kun partnero.

*D: Sed ĉu ili aŭskultos? Ĉu vi povas rakonti iom pri Esperanto en via vivo?*

R: Esperanto donis al mi bonajn amikojn kaj belajn travivaĵojn. Mia edzo ne tre entuziasmas pri tiu lingvo, sed ja toleras, ke mi foje umas en Esperantujo (kaj foje li ĝuas krokodíle la delicojn de nia lingvo). La "movado" en Danio estas tre mikra, tial Esperanto ne plu okupas grandan parton de mia vivo kaj mi ne plu konsideras min kiel movadanon (sed kiel simplan popolanon).

*D: Kaj nun iom pri viaj preferoj? Kio estas la lasta filmo, kiun vi ŝatis*?

R: "Anĝeloj en Ameriko", usona televidserio laŭ la dramoj de Tony Kushner. En tiu serio ni sekvas la vivon de gejoj meze en la 80-aj jaroj, kiam Aidoso komencis falĉi en niaj vicoj… Mi rekonas multe de mia propra vivo kaj demandas min samtempe: ĉu vere ni estis tiel? Mi ankaŭ ŝatas "Dogma" kaj "Renkontu Joe Black" (ne nur pro Brad Pitt). Tio kvazaŭ perturbas min. "Ikuru" de Kurosawa estas simila filmo: vivi ĝis pleneco – eĉ se nur mallonga periodo… La "geja" versio de La *Lago de Cignoj* en la versio de Matthew Bourne estas simile grava. La klasika muziko ravas min. La plej granda sorĉisto kaj deloganto estas Richard Wagner. Ne demandu, kial, ĉar tiam mi fariĝus kvazaŭ senbrida…

*D: Vi rekomendas, ke ni ŝanĝu la temon. Kio pri la samseksamo en Danio?*

R: La plej bona afero estas, ke ni povas vivi en paco; niaj najbaroj ne emas altrudi siajn normojn al nia vivo, kio signifas, ke ni simple vivas en normaleco. Alilandanoj opinias, ke pornaĵoj abundas, sed nia loko tamen ne estas Kopenhago. Fakte ĉio ekster Kopenhago jam estas provinco. Homoj prijuĝas nin laŭ niaj propraj agoj kaj ne laŭ eksteraj etiketoj.

*D: Kiuj estas la plej *pozitivaj* aferoj de via vivo, pro kiuj vi povas danki al via seksorientiĝo?*

R: Nu evidente mia partnero. Foje mi demandas min ĉu mi estus havinta tiom feliĉan vivon sen tiu viro. Mi povas respondi kion ajn, ĉar li ja havas nur bazajn konojn de Esperanto.


*D: Priskribu unu planon vian por la estonteco, kiu inkluzivas kaj Esperanton, kaj agadon rilate al via seksorientiĝo.*

R: Hm, la laboro ja okupas bedaŭrinde tre grandan parton de mia tempo kaj energio, sed iam mi ja ŝatus profundiĝi en iu geja historia temo – eble samseksamo en Mezepoko aŭ Renesanco, tiam la e-a reto de inteligentuloj povus esti avantaĝa. Mi ŝatus atingi ion alian antaŭ ia pensiiĝo.

# BELETRA NIĈO

## Atendo

Kiom longe mi ankoraŭ atendu vin
ĝis kiam vi revenos denove
apenaŭ el profundeco de l' tempo,
el fremdaj landoj
Mia vivo jam etiĝas tago post tago
senforta kaj juna estingiĝas pigre...



Aŭdu, kiom sopirplene susuras folioj de l' arboj
aŭgurantaj aŭtunon. Vidu, koloron de l' ĉielo
makulis nuboj grizaj... frosta pluvo
brakumas la floron... Vi malfruiĝas...
tro malfruiĝas...

Vi alvenos malfrue, nokte, dum frosta vintro
per krispo de l' neĝo, per norda somero
kaj vi ne trovos eĉ unu rozon
eĉ blankan lilion
por donaci al mi...
nur ploron de l' disiĝo.

## Vin fakte mi serĉis

Vin fakte mi serĉis
Viron kun mil' da vizagoj
Kaj ĉiu vizaĝo anĝela kvazaŭ
estas

Vin venis mi renkonti
Ho viro pasanta la saman ritmon
Vi forlasis ombrojn por enveni
lumon
Kaj ĉies via paŝo anĝela estas

Kiam vian vizaĝon mi vidas
La spegulon mi enrigardas
Kiam kun vi mi marŝas

La aman ritmon mi prenas, kaj
la lumon envenas

Ĉeestante kun vi, mi trovas vin,
fakte kiu vi estas
Kaj facile oni povas enamiĝi
Ĉeestante kun vi, mi renaskiĝas
Kaj mia vizaĝo ankaŭ anĝelas

## Se vi deziras

Se vi deziras – lasu min
Foriru – rideton nur ne forgesu
Vi rajtas forgesi: la ĉapelon
la gantojn, adresaron
ĉion alian – ĉar vi revenos
Reveninte, min vi trovos
ĉagrenan,
plorantan
Kaj vi ne lasos min fali.

Se vi deziras resti
Ne forgesu la rideton
Vi rajtas forgesi mian
naskiĝdatrevenon
kaj la lokon de l' unua renkontiĝo
eĉ la unuan kison aman.

Sed tamen, se vi deziras resti
ne faru tion kun profundelspiro
sed kun la rideto

RESTU

## Kun

Kun vi, ventoj pasie blovas
kun vi, Suno kaj Lumo
Je la ora fasko de l' memoro
envolviĝas fadeno roza.

Kun vi, silento kvazaŭ rido
en kies briletas via vizaĝo
kaj dume ni babilas,
amo ĝoja proksime vekiĝas.

Kun vi, tristeco ŝanĝiĝas je floro
kaj senrimarke vivo alvenas
kun vi, ĉio dolĉas
kiel kareso, akvoguteto brila,
kiel sopiro sopira.

ĉio de ***anonima***

# Retaj sugestoj

Se vi havas komputilon kaj interretkonekson kaj laciĝis uzi la konekson por vidi bildojn de nudaj viroj (aŭ virinoj?), mi sugestas ke vi iras al la retejo *Ĉenero* ĉe http://hjem.get2net.dk/chenero/ kie vi trovas multajn ligilojn al esperantopaĝoj. La paĝo sufiĉe ofte aktualiĝas, la plej laste aldonitaj ligiloj estas markitaj per verda koloro. En la paĝo vi unue trovas ligilojn al la diversaj landaj Esperanto-organizoj laŭ la domajna finaĵo (ekz .af *afgana*, .ar *argentina* ktp). Poste venas ligiloj al aliaj diversspecaj paĝoj laŭ alfabeta ordo. Per la listkvadrato supre de la paĝo vi povas filtri la ligilojn laŭ diversaj temoj, ekz. Ligaroj, Literaturo, MP3-sonregistraĵoj ktp. Se vi interesiĝas pri ludoj, vi povas provi jenajn sajtojn:

*Ĉapelludo:*
http://www4.vc-net.ne.jp/~klivo/soft/chapelludo.htm
*Padoj*
www.foessmeier.name/reinhard/primi/lit/apl/padoj
*Litertriso:*
http://www4.vc-net.ne.jp/~klivo/litertriso/
*Skrablo*
http://skrablo.ikso.net/
*La ludo de vivo*
www.argilo.net/funjava.html

Vi eĉ povas vidi televidon en Esperanto ĉe:
http://internacia.tv

Grandan amuzon!

*Andreas*

# Sekvonta FORUMO

Forumo 130 aperos antaŭ jarfino en decembro.

Viaj opinioj, tradukoj kaj ĉiuj aliaj sciigoj estas tre bonvenaj ĝis la 11-an de decembro rete aŭ letere ĉe nia nova provizora redaktanto Andreas aŭ iu alia estrarano!

Forumo estu podio de nia ligo. Sed tio nur estas ebla, se ankaŭ la membroj kontribuas.

Do, se ĉiu membro nur unufoje jare skribas unu artikolon, ni ĉiam havos interesan kaj ampleksan membrogazeton. Ek!

# LSG – Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

**PREZIDANTO**

Arnold, *arvimide(ĉe)earthlink.net*

**SEKRETARIO - KASISTO**
**(kaj redaktanto de tiu ĉi numero)**

Rolf, *lasekretario(ĉe)gmx.net / lakasisto(ĉe)gmx.de*

**provizora FORUMO – REDAKTANTO kaj TTT - EJO**

Andreas, ...@*....com*

**ESTRARANO POR VARBADO**

Francis, *fsoghomonian(ĉe)yahoo.fr*

**ESTRARANO**

Torstein, *kvakke(ĉe)hotmail.com*